BEL informas

n-ro 19/2013

la 20an de septembro 2013

20de stembro de 2013

BEL sendas oficleteron al brazilaj deputitoj

Kunredaktita de BEL kaj BEJO, la estraro de BEL sendis en aŭgusto oficleteron al ĉiu deputito, kiu membras la Komisionon pri Edukado de la Ĉambro de Deputitoj, en Braziljo.

BEL envia ofício a deputados da CE

Redigida em conjunto pela BEL e BEJO, a diretoria da BEL enviou no mês de agosto ofício aos deputados membros da Comissão de Educação (CE) da Câmara dos Deputados.

La oficletero raportas pri la ĉeesto kaj vidpunktoj por-Esperantaj de islandaj ĉefuloj okaze de la ĵusa 98-a UK en Rejkjaviko, cele al favora traktado de la Leĝo-projekto PLS 6162/2009, kiu ŝanĝas la Leĝon n-ro 9.394 de la 20-a de decembro 1996 (Leĝo de Gvidlinioj kaj Bazoj de Edukado) por pritrakti la inkluzivon de la laŭelekta instruo de Esperanto en mezgradaj lernejoj.

Verkita de senatano Cristovam Buarque, la leĝo-projekto atendadas pritraktadon de la Komisiono. Por legi la leteron klaku ĉi tien.

BEL/BEJO

O ofício relata sobre a presença e as manifestações pró-Esperanto de líderes da Islândia por ocasião do 98º Congresso Mundial, recentemente ocorrido em Reiquijavique, visando a favorecer a tramitação do PLS 6.162/2009, que altera a Lei nº 9.394, de 20 de dezembro de 1996 (Lei de Diretrizes e Bases da Educação), para dispor sobre inclusão do ensino facultativo do Esperanto no ensino médio.

De autoria do senador Cristovam Buarque, atualmente aguarda parecer na CE. Para ler o ofício, clique aqui.

BEL/BEJO

BEJK 2014! E-Kongreso okazigos dutagan intensivan kurson por ne-esperantistoj

La 34-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK), okazonta kune kun la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE), inter la 24a kaj la 28a de januaro 2014, en Florianopolo, havos en sia

BEJK 2014! Congresso terá curso intensivo de dois dias para não-esperantistas

O 34º Congresso da Juventude Esperantista Brasileira (BEJK), que acontecerá em conjunto com o 49º Congresso Brasileiro de Esperanto (BKE), de 24 a 28 de janeiro de 2014, em Florianópolis, trará em sua

programo 14-horan intensivan kurson, dividita en du tagojn (sabato 25 kaj dimanĉo 26) inter 9h-12h kaj 14h-18h, por ne-esperantista publiko.

programação um curso intensivo de 14 horas, dividido em dois dias (sábado 25 e domingo 26) com turnos de 9h as 12h e de 14h as 18h, voltado para o público não-esperantista.

Intensiva Kurso de Esperanto

Evento ....
loko ....
dato ....

lernanto ....

Instruisto ....

kursodaŭro: 14 lecionhoroj en du sinsekvaj tagoj
horoj: de 09h00 ĝis 12h00 kaj de 14h00 ĝis 18h00

aliro/metodologio: rekta, konversacia
Ilustraĵoj de Elison Simas

adaptaĵo por intensiva kurso de la libro
Esperanto por Lernejaj klasoj, de Josias Barboza

Lertecoj kaj lingveroj akirotaj en tiu ĉi intensiva kurso:

1 Akiri bazajn informojn pri Esperanto kiel propono por la rolo de internacia lingvo, ĝia idearo, celaro kaj la ecoj, kiuj igas ĝin la plej taŭgan por plenumi tiun taskon en la homa societo; origino, eta historio, nunaj atingoj kaj perspektivoj de Esperanto; klarigo pri duboj kaj misaj konceptoj pri Esperanto; institucioj kaj servoj je dispono de la esperantistoj;

2 komenci kaj vivteni baznivelan komunikadon en plej rutinaj soci-kuturaj situacioj:
. komunikiĝi kun la instruisto en Esperanto en la leciona situacio;
. saluti kaj respondi al saluto neformale;

Tiu senpaga kurso okazos kun minimume 12 kaj maksimume 22 homoj kaj estos instruata de Prof. Josias Barboza, kiu gvidas kaj kunordigas kun Prof. Paulo Nascentes la Esperanto-kurson de Universitato de Braziljo.

O curso, gratuito, ocorrerá com o mínimo de 12 e o máximo de 22 pessoas e será ministrado pelo Prof. Josias Barboza, que coordena, com o Prof. Paulo Nascentes, o curso de Esperanto da Universidade de Brasília.

Prof. Josias aŭtoris la lernopakaĵon Esperanto por lernejaj klasoj, rekomendita de la internacia portalo

O Prof. Josias é autor do curso Esperanto por lernejaj klasoj, recomendado pelo portal internacional

http://www.edukado.net , kaj prezentos novan materialon pri intensiva kurso.

Tial estos akceptata kaj bonvenigata la partopreno de pliaj 8 esperantistoj, preferinde junuloj kaj instruistoj, kiel observantoj kaj eventualaj helpantoj, por analizo kaj lerno pri la metodo. La uzota kajero, 46-paĝa kaj kolora, estos subvenciata de la organizantoj. Por aliĝi al BEJK/BKE musklaku ĉi tie: http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/congresso-e-eventos.html

BEJO

http://www.edukado.net , e apresentará um novo material de ensino intensivo.

Por isso, será aceita e bem-vinda a participação de até oito esperantistas, preferencialmente jovens e instrutores, no papel de observadores e eventuais assistentes, para avaliação e aprendizado do método. A apostila utilizada, de 46 páginas coloridas, será subvencionada pelos organizadores. Para inscrever-se no BEJK/BKE, clique aqui:

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/congresso-e-eventos.html

BEJO

10/09 - LBV pri la Internacia Tago de Prevento kontraŭ Memmortigo

La verkisto José de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), okaze de la Internacia Tago de Prevento kontraŭ Memmortigo, la 10-an de septembro, prezentis en sia retejo artikolon en Esperanto, en kiu li argumentas ke, krom psikologia apogo, spirituala plifortigo estas esence grava por prevento de memmortigo.

10/09 - LBV sobre o Dia Mundial de Prevenção contra o Suicídio

O escritor José de Paiva Netto, diretor-presidente da Legião da Boa Vontade, por ocasião do Dia Mundial de Prevenção contra o Suicídio, dia 10 de setembro, apresentou em sua página artigo em Esperanto, no qual argumenta que, além do apoio psicológico, o fortalecimento espiritual é essencialmente importante para a evitar uma ação suicida.

La artikolo estas legebla ĉe: http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=97978&cs=100

La Esperanto-fako de LBV bonvenigas vian opinion kaj komenton.

O artigo pode ser lido aqui:

http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=97978&cs=100

O departamento de Esperanto da LBV espera opiniões e comentários.

Maria Aparecida da Silva/Esperanto-fako da LBV

Maria Aparecida da Silva / Departamento de Eo da LBV

18-23/09 - Jam okazas: Esperanto partoprenas la Festivalon Asoj de Paco

Kiel ni informis en via BEL Informas 16 (http://esperanto.com.br/bel/2013-08-10), Esperanto estis elektita kiel oficiala internacia lingvo de la Festivalo Asoj de Paco, okazanta en la Kultura Centro Oscar Niemeyer, en Gojanjo, de la 18-a ĝis la 21-a de Septembro 2013.

BEL ĉeestas pere de gravaj reprezentantoj, inter ili membroj de la estraro kaj Fábio Santos, loka BEL-reprezentanto en Gojanjo kaj ĉefrespondeculo pri la por-Esperanta agado en la evento.

18-23/09 - Já está acontecendo: Esperanto participa do Festival Craques da Paz

Como informamos no seu BEL Informas 16 (http://esperanto.com.br/bel/2013-08-10), o Esperanto foi escolhido como a língua internacional oficial do Festival Craques da Paz, que já está acontecendo no Centro Cultural Oscar Niemeyer, em Goiânia, de 18 a 21 de setembro de 2013.

A BEL está presente por meio de importantes representantes, dentre eles membros da diretoria da BEL e Fábio Santos, representante local da BEL em Goiânia e líder as ações pró-Esperanto no evento.

Pli ol 2.000 informfolioj pri Esperanto estis senditaj de Braziljo al la ĉefurbo de Gojaso kaj aliaj miloj estis loke presitaj. Oni kalkulas, ke dekmiloj da homoj partoprenos la eventon. La evento estas senpaga. La dulingva portalo por pli da informoj estas: www.festivalcraquesdapaz.org .

Teamo BEL Informas

Mais de 2.000 informativos sobre o Esperanto foram enviados de Brasília para a capital de Goiás e outros milhares foram impressos localmente. Estima-se que dezenas de milhares de pessoas participarão do evento. O evento é gratuito. O portal bilíngue para mais informações é: www.festivalcraquesdapaz.org.

Teamo BEL Informas

22/09 - La 7-a ZOMAER alvenas! Partoprenu!

22/09 - O VII ZOMAER tá chegando! Participe!

VII ZOMAER

Encontro de Esperanto da Zona da Mata Mineira

dia **22 de setembro de 2013 – domingo**

em **JUIZ DE FORA – MG**

Local: FEAK – Rua Itamar Soares de Oliveira, 200 Cascatinha

8h-	Recepção e lanche
9h-	Abertura: formação da mesa, hino do Esperanto, apresentação das cidades.
9:30h-	Prelego: La rolo de Esperanto pri la antaŭgardo de lingvoj kaj kulturoj. Profª Nazaré Laroca.
10:30h-	Prelego: La misio de Esperanto. Prof. Fábio Fortes. Minicurso de Esperanto. Prof. Marco Antonio Fietto.
11:30h-	Almoço
13h-	Reunião do SEM e Delegados Regionais.
14h-	Palestra: O papel do Esperanto na preservação das línguas e culturas. Profª Nazaré Laroca.
15h-	Palestra: A missão do Esperanto. Prof. Fábio Fortes.
16h-	Lanche
16:30h-	Arta Vespero e pré lançamento do CD Infantil de músicas em Esperanto de Dirce Sales.
17:30h-	Confirmação da próxima cidade-sede do VIII ZOMAER. Entrega da bandeira, hino do Esperanto, despedida.

Ŝatu en facebook:

https://www.facebook.com/esperantojuizdefora

Curta no face:

https://www.facebook.com/esperantojuizdefora

24/09 - Partoprenu lecionon vive per videokunveno de Google

Grupo de instruistoj, kunigitaj ĉe la platformo Google+, okazigos lecionon vive per videokunveno ĉi-marde, la 24-a, je la 20h. Ĝi estos konversacia leciono por komencantoj, uzanta la vortstokon de la leciono 1-a de la kurso Ana Pana.

24/09 - Participe de aula ao vivo em videocon do Google

Um grupo de professores, reunidos na plataforma Google+, promoverão aula ao vivo por videoconferência nesta terça-feira, dia 24, às 20h. A aula será de conversação para iniciantes, usando o vocabulário da lição 1 do curso Ana Pana.

Spektu filmon pri la leciono 1-a ĉi tie: http://player.vimeo.com/video/60842682 .

La leciono okazos per la "Hang Out" de Google+: https://plus.google.com/u/0/events/c4grvftmlp480ufsoasokrqg7oc?cfem=1

Pri uzmaniero, registro kaj funkciado lernu ĉii tie: http://youtu.be/uJWe1pALo8E?t=1m34s

Se vi estas instruisto kaj volas instrui en aliaj tagoj kaj horoj, kontaktu nin.

Emilio Cid

Assista a um vídeo sobre a lição 1 aqui: http://player.vimeo.com/video/60842682 .

A aula será no "Hang Out" do Google+: https://plus.google.com/u/0/events/c4grvftmlp480ufsoasokrqg7oc?cfem=1

Sobre como usar o Google Hangout, como se cadastrar e como funciona, aprenda aqui: http://youtu.be/uJWe1pALo8E?t=1m34s

Se você é professor e quer ensinar em outros dias e horários, entre em contato conosco.

Emilio Cid

Atenton! BEL Informas volas scii: kiuj estas niaj venontaj eventoj?

Atenção! O BEL Informas quer saber: quais são nossos próximos eventos?

Sennombro da eventoj okazas en Brazilo dum la tuta jaro. Parto de la misio de la Brazila Esperanto-Ligo estas ilin disvastigi al ĉiuj, kaj BEL Informas estas komunikservo je la dispono de nia tuta

São inúmeros os eventos de Esperanto no Brasil durante todo o ano. Uma das missões da Liga Brasileira de Esperanto é divulgá-los a todos, e o BEL Informas é um serviço de comunicação que está à disposição de

komunumo. Sendu al ni novaĵojn pri eventoj en via regiono - miloj da homoj scios pri ili kaj faros ilin sukcesaj pere de nia BEL Informas. Ni atendas!

toda a comunidade esperantista. Envie-nos novidades de eventos em sua região - milhares de pessoas poderão inteirar-se deles e garantir seu sucesso por meio de nosso BEL Informas. Estamos aguardando!

bel.informas@gmail.com

Teamo BEL Informas

Equipe BEL Informas

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Novos títulos em sua BEL@Butiko

Novaj titoloj en via BEL@Butiko

La legisto kaj Dek libroj.

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos

belabutiko@esperanto.org.br

Francisco Mattos

belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto
Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Anna Lobo, Antonio Felix,
Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu kontribuojn al bel.informas@gmail.com

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel